# Ĉu Harald Bludentulo estis falsisto?

***Prelego en Aarhus 31. de majo 2024***

## Transnacia historio

Origine, historiisto estis skribisto kiun mendis iu potenculo por verki **glorajn rakontojn pri la potenculo** mem kaj liaj antaŭuloj. Poste, kiam la nacioj estis inventitaj, oni uzis la historion por **glori la nacion**. Sed nun la tutmondiĝo estas tiom progresinta ke tio fariĝis tro malvasta. Pli kaj pli vaste oni sentas la bezonon de historioj kies celo **ne estas glori la nacion kaj ĝiajn aliancanojn, sed la homaron** entute. La historiistoj mem nomas tiun tendencon "**transnacia historio"**.

Tio estas tre interesa evoluo por ni Esperantistoj. Ja la **pasinteco de Esperanto** estas evidente interesa temo por transnacia historio, tute egale kion oni opinias pri la **estonteco de nia lingvo**. Ni ankaŭ estas en tiu favora pozicio ke la Esperantistoj de la pasinteco havis multe da historia konscio. Ekzistas ne malmultaj Esperantaj **arkivoj, bibliotekoj kaj muzeoj** – la planlingva kolekto en la Aŭstra nacia biblioteko estas nur la plej fama.

Aliaj transnaciaj fenomenoj estas malpli bone priskribitaj. Surprize malmulte estas skribita ekzemple pri la **Ligo de Nacioj** antaŭ la dua mondmilito, aŭ pri la **pacmovado antaŭ la unua mondmilito**. La Ligo de Nacioj transprenis la arkivojn de la pacmovado, kaj ili ankoraŭ troviĝas en Svislando, nun sub la zorgo de la **Unuiĝintaj Nacioj**. Sed ĝis nun malmultege da historiistoj utiligis tiujn arkivaĵojn. Estas **pli malfacile ekkoni** la historion de la Ligo de Nacioj ol la historion de Esperanto.

Sed transnacia historio ne temas nur pri plivastigo de la historia kampo. Ĝi ankaŭ temas pri **novaj aliroj al la naciaj historioj** – novaj interpretoj de establitaj faktoj, kiuj eble ne estas tiel establitaj kiel ili ŝajnas. La tempo estas matura por defii la **fundamentajn rakontojn** de la nacia historio. Kaj la plej fundamenta rakonto pri la Dana nacia historio estas la monumentaro de Jelling.

# La monumentaro de Jelling

La monumentaro de Jelling estas tutmonde fama. Ĝi estas en la listo de **mondaj heredaĵoj** de Unesko. La Dana **pasporto** estas ilustrita per unu el la tieaj runŝtonoj. La reĝo, kiu ordonis starigi tiun runŝtonon, nomiĝis Harald Bludentulo – kaj la fama komputila komuniknormo **Bluetooth** estas nomita laŭ li. La logotipo de Bluetooth estas la runoj H kaj B skribitaj kiel unu signo: .

Malgraŭ tio la monumentaro estas tre mistera. Ĝi estis reĝa rezidejo nur dum tri generacioj, sed dum tiu tempo estis starigitaj:

- 1 ŝtonŝipo (skibssætning);
- 2 tumuloj (gravhøje);
- 2 runŝtonoj;
- 4-angula palisaro de 360 oble 360 metroj.

Sed ankaŭ aliloke okazis grandaj konstrulaboroj. Ĉe Ravning sude de Jelling oni konstruis 1 grandan lignan **ponton** sur rivero. Diversloke en la lando aperis 6 **treleborgoj,** grandaj rondaj fortikaĵoj el tero kaj traboj.

Ĉiuj tiuj konstruaĵoj estis **la plej grandaj en Nordio** tiutempe kaj la granda runŝtono de Jelling **restas la plej granda** runŝtono entute. La granda runŝtono ne havas la plej longan **tekston** de ĉiuj runŝtonoj – sed tio estas ĉar ĝi estas pli riĉe ilustrita ol iu alia runŝtono.

Sed kiu do **havis la potencon por ordoni** tiel vastajn konstru-laborojn? Jen kion diras pri tio la malgranda runŝtono de Jelling:

> (1) Reĝo Gorm faris ĉi tiujn monumentojn memore al Thyra, edzino
> (2) sia, la 'bōt' de Danio.

La vorto **'bōt'** estas la sama kiel la hodiaŭa Dana 'bod', kiu ja povas havi multajn sencojn. Estas iom neklare en kiu senco oni uzis ĝin en la deka jarcento, kaj ni revenos al tio. – Kaj jen kion diras la granda runŝtono:

(1) Reĝo Harald ordonis fari ĉi tiujn monumentojn memore al Gorm, sia patro, kaj al Thyra, sia patrino – tiu Harald, kiu gajnis por si Danion tutan
(2) kaj Norvegion
(3) kaj kristanigis la danojn.

Gorm kutime estas kalkulata kiel la unua vera reĝo de Danio, kaj Harald kiel la dua, nelaste pro ĉi tiuj runŝtonoj. Ni nomas ilin **Gorm la Maljuna** kaj **Harald Bludentulo** por distingi ilin de aliaj samnomaj historiaj personoj. Efektive ekzistas spuroj de **pli fruaj regantoj de tuta Danio**, kaj oni ja atendus ke la nacia historio elektus la laŭeble plej fruan. Sed ĉi-okaze la nacia historio havas motivon por **malpliigi la danan gloron**, dum tion la transnacia historio ne havas. Ankaŭ al tio ni revenos.

Kiu do konstruigis kion? La **ŝtonŝipo** en Jelling estas du vicoj da ŝtonegoj metitaj en la formo de ŝipo, kaj precize meze de tiu ŝipo situas la malpli granda el la du tumuloj. Tio estis normala pagana maniero entombigi eminentulon. Sed la pli granda tumulo estas metita *sur* la sudan parton de la ŝtonŝipo, kvazaŭ **senvalidiga stampo**. La ŝtonŝipon kaj la unuan tumulon do evidente konstruigis Gorm, dum Harald poste konstruigis eĉ pli grandan tumulon kaj eble ankaŭ la unuan lignan preĝejon de Jelling.

Sed ambaŭ tumuloj estis **malplenaj** kiam oni elfosis ilin. En la pli malgranda norda tumulo estis tombo sufiĉe granda por du personoj, sed la ostoj kaj la tombodonacoj estis delonge forportitaj. Kaj en la pli granda suda tumulo, neniam ekzistis eĉ tombo! Oni konjektas ke la suda tumulo estis rezervita por Harald mem, sed oni ne scias.

En 1976 oni trovis viran skeleton sub la planko de la preĝejo de Jelling. Oni tuj supozis ke tio estas Gorm, kiun Harald **reentombigis** laŭ Kristanaj ritoj. Nuntempe oni komencis dubi pri tio, ĉar kien do malaperis la skeleto de **Thyra**? Ĉu Harald entute konstruigis **lignan preĝejon** tie kie la ŝtona preĝejo staras nun? La arkeologio ne donas klarajn respondojn.

## Aggesen kaj Saxo

Entute estas iom strange ke la centro de la unuigita Danio estis Jelling. Dum multaj generacioj **antaŭ Gorm**, la  plej grava potencocentro en la

regiono de la Danaj markoloj estis **en Lejre** sur Selando. La filo de Harald Bludentulo, **Sven Forkbarbulo**, ribelis kontraŭ sia patro, kaj metis sian ĉefrezidejon en Roskilde – tuj norde de Lejre.

Rolas iu Jutlanda-Selanda dinamiko ĉi tie. Ĝin oni vidas ankaŭ ĉe niaj unuaj historiistoj, la Jutlandano **Sven Aggesen** kaj la Selandano **Saxo Grammaticus**. Ili ambaŭ laboris por la Dana ĉefepiskopo Absalon kaj skribis siajn historiojn Latine ĉirkaŭ la jaro 1200, iom pli du jarcentojn post la ribelo de Sven Forkbarbulo.

**Saxo** verkis la faman *Gesta Danorum,* “Agoj de la Danoj”. Tie li preterlasas neniun okazon por akcenti ke Selando estas la plej eminenta parto de Danio kaj Roskilde estas la plej eminenta loko de Selando. Aliflanke **Aggesen**, en sia multe pli modesta verko, havas la rimarkigon pri Lejre, ke ĝi “nuntempe estas unu el la plej mizeraj vilaĝoj de Selando”.

Plejparte la du historiistoj tamen kongruas inter si. Ili ambaŭ rakontas ke **Gorm** la Maljuna estis neambicia kaj ne tre taŭga reĝo. Kontraste **Harald** Bludentulo laŭ ili estis troambicia tirano. Sed **Thyra**, la edzino de Gorm kaj patrino de Harald, estis la perfekta idealo de reĝino. Precipe Aggesen estas absolute enamiĝinta al ŝi je distanco de du jarcentoj.

La **runŝtonoj konfirmas** ke Thyra estis ege populara siatempe. Ŝi aperas ne nur sur la du runŝtonoj en Jelling, sed ankaŭ sur tri, eble kvar pliaj runŝtonoj sude de Jelling – fakte ŝi estas la plej menciita persono sur Danaj runŝtonoj!

La precizaj **kaŭzoj de ŝia populareco** tamen perdiĝas en nebulo. Tiutempe geedziĝo ne tiom estis inter du personoj, sed inter du familioj. La reĝaj geedziĝoj havis tutlandajn, eĉ internaciajn konsekvencojn. Tial estas ege strange ke **Aggesen** tute ne mencias de kie venis Thyra, kvankam li longe priparolas ŝin en sia mallonga verko.

**Saxo** asertas ke Thyra estis filino de Angla reĝo, sed tio estas absolute nekredinda, jam pro ŝia nomo. “Thyra” estas Latinigo de *Þōrvī,* “dediĉita al la pagana dio Tor”, kaj tiutempe la Angloj delonge estis Kristanoj. Aliaj fontoj asertas ke ŝi venis de suda Jutlando aŭ de Holstinio.

## La misteraj runoj

La deveno de Thyra aliĝas al la longa vico da misteroj ĉirkaŭ la monumentoj en Jelling. Sed estas ja en si mem mistero kial entute la Skandinavoj tiutempe havis siajn proprajn literojn, la runojn. Ili ne havis literaturon, do **por kio utilis la runoj**? El antaŭ la vikinga tempo la arkeologoj eĉ trovis pli da **importitaj luksaĵoj kun Latinaj surskriboj** ol da objektoj kun runoj. La runojn oni do evidente origine uzis nur tre malofte, por celoj tute specialaj.

Iuj runologoj, precipe Danaj, malgraŭ kompleta manko de pruvoj insistis ke skribo ĉiam estas neŭtrala **komunikilo**, kiu aperas ĝuste tie kie ĝi estas bezonata por komerco aŭ administrado. Aliaj asertis, kun same multe da fantazio kiel malmulte da pruvoj, ke la runoj ekestis pro **magiaj** celoj.

Tria propono, kiu hodiaŭ estas la plej vaste subtenata, estas ke iu Ĝermana tribo ĉe la limo de la Roma imperio kreis la runojn kiel **identigilon**. Kiel diras la Germanoj, *so ein Ding müssen wir auch haben* – ion tian ankaŭ ni havu. Sed oni ne volis simple imiti la Romanojn, oni volis havi ion propran!

Ankaŭ tiu tria propono ne estas tre kredinda. Tial mi mem volas prezenti **kvaran teorion**: la runoj estis inventitaj kiel **militista ĉifro de Arminius**. Arminius estis la Ĝermana tribestro, kiu gvidis la masakron de tri Romaj legioj en la jaro 9 post Kristo. Tiamaniere li malhelpis la Romian imperion ekspansii trans Rejnon.

Estas evidente ke tia evento devis reeĥi en la tuta Ĝermana mondo. Se la runojn efektive inventis Arminius, tiam ili sendube ludis gravan rolon en lia venko kontraŭ la Romanoj. Tiam estas tute nature ke kune kun la kantoj pri Arminius disvastiĝis ankaŭ lia invento la runoj – sed unuavice kiel **militista sekreta skribo**, por komuniki nerimarkate.

Kio ajn estas la origino de la runoj, kiam ni atingas la vikingan epokon, ili jam havas iom pli vastan aplikon. La modo uzi ilin sur **memorŝtonoj** ekestis en Norvegio. Tie la runŝtonoj tamen neniam multe furoris. La

familio de Harald Bludentulo venis de **Norvegio**, do eble kiam iu lia prapatro akiris teron en Danio la kutimo de runŝtonoj alvenis ĉi tien.

Ĉiuokaze la granda runŝtono en Jelling inspiris al multe **pli ofta starigo** de ili. Tio kulminis en Svedio dum la frua Kristana tempo. Ekzistas ankaŭ paganaj runŝtonoj, precipe en Norvegio, sed **la ideo mem:** ke indas uzi skribon sur ŝtono por memorigi pri forpasintaj eminentuloj, ŝajnas esti Kristana influo en socion ankoraŭ paganan.

## La teorio de Peter kaj Birgit Sawyer

Runŝtonojn oni kutime starigis ne apud la tombo, sed tie kie ili estis vidotaj de laŭeble multaj homoj. Krome, oni ĉiam skribis ne nur la nomon de la mortinto, sed ankaŭ tiun de la ŝtonstariginto. Tial multaj runologoj hodiaŭ opinias ke la runŝtonoj ĝenerale estis ne nur memorŝtonoj, sed ankaŭ iaj **testamentoj**.

La historiista geedza paro **Peter kaj Birgit Sawyer** opiniis ke tio validas ankaŭ por la ŝtonoj en Jelling. Peter estis Anglo kaj Birgit estis Svedino, kaj ilia granda komuna intereso estis la frua mezepoko en Skandinavio, alivorte la vikinga epoko.

Laŭ ges-roj Sawyer, la malgranda runŝtono de Jelling estas falsaĵo farita de Harald Bludentulo. **Gorm mortis antaŭ Thyra**, kaj ja estas iom malfacile starigi ŝtonojn kiam oni mem estas mortinta. Tio en si mem estas tre kredinda, ĉar la malgranda runŝtono de Jelling efektive estas la sola fonto kiu asertas ke Thyra mortis la unua. Ĉiuj aliaj fontoj, nelaste Saxo, diras ke unue mortis Gorm kaj nelonge poste lia vidvino.

Sed kio do estus la **motivo** de Harald? Kial li volus falsi la historion? La teorio de ges-roj Sawyer estas la jena:

En la Dana lingvo mem, Danio nomiĝas Dan<u>mark</u>. “**Marko**” en tiu kunteksto estas limlando. Danio do origine estis rigardata kiel randa regiono de iu pli granda lando, kaj kutime oni konjektas ke tiu lando estas Germanio – aŭ pli ĝuste la Franka regno, la imperio kreita de Karolo la Granda.

Sed ges-roj Sawyer asertas ke antaŭ la geedziĝo de Gorm kaj Thyra, la Dana **lando** estis nur la partoj okcidente de la Granda Belto. Tiuj estis sub la plena rego de iu Jutlanda reĝo. La Dana “**marko**” do estus la insuloj oriente de la Granda Belto, randa lando ne rekte kontrolata de la reĝo de Jutlando-Fueno. La Dana “marko” tiam estus la **doto** de Thyra, filino de reĝo en Lejre. Nur per la geedziĝo de Gorm kaj Thyra la tuta lando venis sub la aŭtoritaton de unu sama reĝo.

La runŝtonoj sude de Jelling, kie Thyra estas menciita, estis starigitaj de ŝia **bienadministranto Tue**. Laŭ ges-roj Sawyer tiu bienadministranto estis la edzo de Thyra dum la mallonga tempo inter la morto de Gorm kaj la morto de Thyra mem. La doto de Thyra – orienta Danio – do estus heredota de ŝia nova edzo. Se Tue kaj Thyra ne havus infanojn, la heredo plupasus al la familio de Thyra en Selando. Tiam Harald ne plu povus pretendi esti reĝo super orienta Danio.

Sed se Thyra mortus **antaŭ Gorm**, ŝian doton heredus Gorm. Gorm siavice heredigus al sia filo Harald la reĝecon super orienta Danio. Tial, laŭ gesinjoroj Sawyer, gravis al Harald kredigi al la mondo ke Thyra mortis la unua.

## Dan<u>mark</u>

Laŭ mi, tiu teorio estas prava en la **ĝeneralaj trajtoj**: Thyra venis de la medio ĉirkaŭ Lejre, kaj la malgranda runŝtono de Jelling estas mensogo de Harald Bludentulo por legitimigi sian regadon. La **detaloj** de la teorio tamen ne estas teneblaj.

Unue, Thyra plej kredeble **mortis vidvino**. La runŝtonoj de ŝia bienadministranto Tue estas protesto kontraŭ la politiko de Harald post ŝia morto. Li starigis ilin ne kiel ŝia edzo, sed kiel ŝia dungito. La plej multaj runŝtonoj estas starigitaj de parencoj de la mortinto, sed ofte okazis ke dungitoj memorigis pri dungintoj aŭ inverse.

Due, la nomo **Dan<u>mark</u>** por la tuta lando estas jarcenton pli malnova. Kiam la Franka imperio ekspansiis sub Karolo la Granda, la Danoj devis

decidi kiel reagi al tiu situacio. Aŭ ili povis unuiĝi ĉirkaŭ unu sufiĉe forta reĝo kaj fidi al **la malnovaj dioj** por defendi sian memstarecon. Aŭ ili povis akcepti la superregon de la imperiestro kaj fariĝi **Kristanigata** “marko” de la imperio kreita de Karolo.

Reĝo **Godfred** sukcesis unuigi sub si ĉiujn landojn ĉirkaŭ Kategato – do ne nur la pli grandan parton de la nuna Danio, sed ankaŭ partojn de Svedio kaj Norvegio. Post tiu sukceso, li volis ekspansii en la Frankan regnon. Liaj filoj tamen vidis ke tio estas tro ambicia, do ili mortigis lin.

Tio estis **normala proceduro** tiutempe. Se estis sufiĉe da malkontento pri la politiko de la reĝo, oni persvadis iun lian parencon mortigi lin. Tiel okazis al Godfred, tiel okazis al Arminius antaŭ li, kaj tiel okazis al Harald Bludentulo post li. Post kiam la Kristanismo establiĝis, filoj ne plu mortigadis siajn patrojn, sed inter la filoj ankoraŭ povis okazi militoj pri la trono.

Post la morto de iu reĝo, ĉu pro aĝo, ĉu pro aliaj kaŭzoj, la nova reĝo devis esti aprobita de la tiel nomataj **parlamentoj**, kunvenoj de la ĉefoj de ĉiu regiono de la lando. En la kazo de Godfred, liaj filoj heredis la reĝecon komune. Ili ŝanĝis la politikon de sia patro, tiel ke la projekto “regno de la Danoj” estis ĉesigita, kaj anstataŭe ili lanĉis la projekton “marko de la Danoj”. Ili deziris la titolon de vasalo anstataŭ la pli gloran, sed pli malsekuran de suvereno.

Sed ankaŭ **vasalo** de la imperiestro devis esti forta. Teni la imperiestron for de Danio estis relative facile. La Franka imperio estis forta surtere, sed malforta surmare, do la insulojn ĝi ne povis konkeri. Ĉe Ŝlesvigo estis nur tre mallarĝa terpeco kie armeo povis transiri, do ankaŭ estus malfacile al la imperio teni Jutlandon. Kiu volis esti vasalo, do bezonis havi **la monopolon de perforto** surtere kaj surmare en la tuta regiono inter la Norda Maro kaj Skanio.

Sed estis la **vikinga epoko**. Ĉiu ajn Dana ĉefo povis lanĉi vikingan ekspedicion. Tio estis riska entrepreno, sed se ĝi estis sukcesa, la ĉefo

povis reveni kun multe da riĉaĵoj kaj multe da batalharditaj militistoj. Ĉiu ĉefo povis minaci la ceterajn, kaj la vivo entute estis tre malcerta.

La nomo Dan<u>mark</u> por la tuta lando do estas atesto pri **la tiama revo**: ke eblus havi unu reĝon tiel fortan, ke li povus regi Danion, *ĉu* kiel memstaran, *ĉu* kiel "markon" de la Franka regno – sed ĉiuokaze kiel unu tuton, kun interna paco.

Mi kredas ke mi estas la unua kiu faras ĉi tiun interpreton de la konataj faktoj. Laŭ la vidpunkto de nacia historio ja estas absolute nepenseble ke la sankta nomo de Danio atestas pri siatempa **sopiro absorbiĝi en Germanio**! Sed la transnacia historio kapablas rigardi la aferon el pli da flankoj.

La laboro de ges-roj Sawyer estas tipa ekzemplo de **la transiro** el strikte naciaj al transnaciaj vidpunktoj. Mi kredas ke ni kiel Esperantistoj devas treege interesiĝi pri tiu ĝenerala evoluo de la historiista profesio, kaj ne nur ĝui la pli altan prestiĝon kiun ĝi donas al nia movado.

## Klara kaj sekura monopolo de perforto

Do, reen al Jelling:

Kiam Gorm kaj Thyra geedziĝis, "Danio" estis jam establita koncepto. Sed kion do celas Saxo, kiam li skribas ke Thyra postulis de Gorm "Danion kiel matenan donacon"? **Doto** estas donaco de la edzina familio al la geedza paro, kaj **matena donaco** estas donaco de la edzo al la edzino. Laŭ ges-roj Sawyer, Saxo simple konfuzis doton kaj matenan donacon; sed Saxo certe tre bone konis la distingon.

Laŭ mi, temas nur pri troigo: la Selanda familio de Thyra postulis ne tutan Danion por ŝi, sed jes **grandajn bienojn en Jutlando**. Tio estis ilia kondiĉo por aprobi Gorm kiel reĝon de tuta Danio kaj lasi Thyra-n trans-lokiĝi al lia ĉefrezidejo.

La geedziĝo inter Gorm kaj Thyra do egalis al alianciĝo inter la du plej potencaj familioj en orienta kaj okcidenta Danio. Ĝi vekis en la tuta popolo la esperon, ke nun fine estas **klara kaj sekura monopolo de**

**perforto** en Danio. Plenumiĝis la revo pri enlanda paco – kaj pri tiom pli facila rabado eksterlande. Aparte rabinda estis Anglio, kiu estis same riĉa kiel la Franka regno, sed malpli efike protektata.

Thyra fariĝis la ĉefa simbolo de la Dana unueco. Ŝi estis la riparo, la tutigo kaj la perfektigo de Danio – kaj ***bōt*** povis havi ĉiujn tiujn sencojn. Estas dubinde ĉu Gorm mem donus tiel flatan kromnomon al sia edzino, ĉar tiam li ja aspektus kiel la duaranga persono en la geedzeco. Ĝi tamen bone konformas al la ideoj de Saxo kaj Aggesen pri ilia interrilato. Tio siavice konformas al la teorio ke **la malgrandan runŝtonon de Jelling** ne starigis Gorm, sed Harald, kiu volis ekspluati la popularecon de sia patrino.

Harald Bludentulo verŝajne kredis ke li povos riĉiĝi fariĝante vasalo de la imperiestro kaj poste ankoraŭ pli riĉiĝi lanĉante atakojn sur Anglion. Certe li havis tute precizan planon, ĉar nenio ĉe Harald Bludentulo estas hazarda. Ĉiuj liaj konstruaĵoj estas treege precize projektitaj. Same kiel **Egon Olsen** de la Olsen-bando li kredis ke li havas la perfektan planon: ĉio havis sian pripensitan lokon, ĉio estis detale organizita kaj antaŭplanita. Kaj same kiel Egon Olsen li estis certa ke nenio povos misfunkcii – ĝis, kompreneble, tamen fiaskis la plano.

Estas rimarkinde ke Harald enpostenigis **la unuajn episkopojn** en partoj de Jutlando kie *ne* estis treleborgo proksime: Ŝlesvigo, Ribe kaj Århus. Do en tiuj partoj de la lando lia potenco estis sufiĉe sekura. Aliloke estis tro danĝere por la disvastigantoj de la nova religio – ne tiom ĉar ili estis Kristanoj, sed ĉar ili reprezentis ankaŭ **la reĝan potencon**. Tiujn regionojn Harald intencis subigi perforte.

La treleborgoj kaj aliaj konstruaĵoj servis unuavice por **demonstri la potencon** de la reĝo, kaj nur duavice por praktikaj celoj. Tio estis normala tiutempe. Sed Harald Bludentulo iĝis malpopulara ĉar liaj eksterordinaraj konstruadoj kostis eksterordinare multe, kaj la kostojn pagis la popolo.

Unu el liaj konstruaĵoj tamen trovis aprobon, nome fortikigo de **Dannevirke**, la jam ekzistanta remparo ĉe la suda landlimo. Tio videble

utilis al la tuta lando, ne nur al la reĝo. Sed ĉar tio estis escepto, la posta tempo atribuis la tutan konstruon de Dannevirke al lia patrino Thyra.

Ankaŭ la runŝtonoj de Harald servis por demonstri lian potencon. La grandan runŝtonon ni kutimas nomi "**la baptoatesto de Danio**", ĉar tie la nomo de la lando estas dokumentita unuafoje en la lando mem. Al ni hodiaŭ ŝajnas tute nature ke Harald volis dokumenti sian oficialigon de Kristanismo per skriba monumento, sed fakte tio estas malkutima. Nek Svedio nek Norvegio havas similan "baptoateston".

Reĝoj entute **normale ne starigis** runŝtonojn. Ĉiuj sciis kaj konsentis kiu estas reĝo, kaj se iuj ne konsentis, ĉiuokaze estis milito. Ambaŭokaze dokumentado estis superflua.

Ankaŭ estas rimarkinde ke la teksto sur la granda runŝtono estas **horizontala**. La malgranda runŝtono estas normala tiurilate. Oni ĉizis la tekston laŭlonge de la ŝtono dum ĝi ankoraŭ kuŝis. Tiam oni starigis ĝin, kaj tial oni ĉiam devas klini la kapon por bone legi la vertikalan tekston. Sed Harald ordonis ke la teksto de la granda runŝtono aspektu kiel en tiutempa manuskripto. Manuskriptojn produktis monaĥoj, do tio estas maniero demonstri Kristanismon eĉ en la plej malgrandaj detaloj. Ege pripensite.

La **lokigo** de la granda runŝtono ankaŭ estas tre pripensita, ĉar ĝi staras precize meze inter la du tumuloj. Tiu ŝtono do estis sukcesa parto de la plano de Harald. Sed **la malgranda runŝtono ŝajnas esti atesto pri lia fiasko**. Post la morto de Harald ĝi kuŝis ses jarcentojn antaŭ la preĝejo kaj funkciis kiel benko. Tiam la aŭtoritatoj starigis ĝin apud la grandan runŝtonon, sed ĝi ĉiuokaze troviĝas tute ekster la severa simetrio de la ceteraj monumentoj en Jelling. Tio estas tre suspektinda.

Suspektinde estas ankaŭ ke Thyra ricevis **la kromnomon 'bōt'** sur la malgranda runŝtono, ĉar sur runŝtonoj oni kutime ne indikis kromnomojn. Norde de Jelling, tamen, staras alia runŝtono en Sønder Vissing inter Horsens kaj Silkeborg. Sur ĝi Harald mem ricevis **kromnomon**.

Reĝo tiutempe devis travojaĝi sian landon de tempo al tempo por aserti sian potencon. Diversloke en la lando li mem posedis grandajn bienojn. En ĉiu tia loko, kie li estis **samtempe gasto kaj gastiganto**, li havis alian edzinon. Ankoraŭ longe dum la Kristana tempo tia poligamio restis tute normala, kvankam la eklezio forte kondamnis ĝin.

La runŝtono en **Sønder Vissing** estis starigita de tia edzino de Harald. Jen ĝia teksto:

> (1) Tove, filino de Mistivoj, farigis monumenton memore al sia patrino, estante edzino de Harald la Bona, filo de Gorm.

Unue ni rimarkas ke Tove ne mencias la nomon de sia patrino, sed jes tiujn de siaj patro, edzo kaj bopatro. **Mistivoj** estis la reĝo de la **Abodritoj**, Slava tribo en la nuna nordorienta Germanio. La geedziĝo inter Tove kaj Harald konfirmis aliancon inter la Danoj kaj la Abodritoj, kiuj ambaŭ bezonis kunordigi sian politikon rilate al la Franka regno.

Tove do estis kreskinta ĉe la Slavoj, kiuj ja ne havis la kutimon de runŝtonoj. Alia strangaĵo estas ke ni ne konas la nomon “**Harald la Bona**” de iu ajn alia loko. Do ŝajnas tute evidente ke ne Tove mem decidis starigi la ŝtonon, sed ŝia edzo Harald. Li uzis la morton de sia bopatrino kiel okazon por flegi sian reputacion.

## La falsigo de la malgranda ŝtono de Jelling

Sed Harald fiaskis, ĉar li miskalkulis la estontecon – ankaŭ tiusence ke liaj runŝtonoj ludis neniun rolon en la histori-verkado dum la sekvaj jarcentoj. Saxo estas tre konscia pri la runoj kaj ofte mencias ilin, sed nek li nek Aggesen uzas **runŝtonojn kiel fontojn**. Ĉiujn siajn informojn ili ĉerpas el buŝaj rakontoj aŭ latinlingvaj libroj. Nur en la 1870-aj jaroj oni komencis preni la tekston de la runŝtonoj vere serioze, kaj nur en la 1980-aj jaroj oni komencis suspekti ke iu aŭtenta runŝtono povus esti starigita de alia persono ol la runa teksto mem asertas.

Kvankam Saxo kaj Aggesen ne uzas rune skribitajn fontojn, ili ambaŭ raportas ke la ribelo kontraŭ Harald atingis Jelling, ĝuste kiam li volis

**starigi grandan memorŝtonon ĉe la tombo de sia patrino**. Do, ne memore al ambaŭ siaj gepatroj, sed nur al la patrino. Sendube do temas pri la malgranda runŝtono de Jelling.

La enskribo de la malgranda runŝtono troviĝas sur **du kontraŭaj flankoj.** Dum la ŝtono kuŝis antaŭ la preĝejo kiel benko, homoj sidadis sur la frontflanka teksto. Tial ĝi estas multe pli viŝita ol la dorsflanka. Kiel do Harald sukcesis kredigi al siaj samtempuloj ke anstataŭ *Gorm* kaj *edzino* oni legu *Harald* kaj *patrino*?

Laŭ Saxo, Harald trovis la ŝtonon **ĉe Jutlanda marbordo**. Evidente do, Harald mem tie ĉizis la komencan tekston sur la fronta flanko. Tiam li ordonis renversi la ŝtonon, tiel ke tiu flanko estis kaŝita, kaj ĉizis la dorsan tekston.

Laŭ Saxo, Harald tiam ordonis venigi **bovoĉaron.** Sur ĝin estis levita la ŝtono – laŭ mi, ĉiam kun la fronta parto malsupre. Saxo plue informas ke kun granda peno oni tiam veturigis la ĉaron al Jelling. **Preskaŭ ĉe la celo** alproksimiĝis al Harald viro, kiu ĵus revenis de lia filo Sven.

> “Ĉu vi iam antaŭe vidis homojn tiradi tiel grandan ŝarĝon?” fiere demandis lin Harald.
> “Jes”, laŭte diris la viro, “mi ĉeestis kiam antaŭ nelonge tuta Danio estis tirita for de vi.”

La ĉirkaŭstarantoj tuj ekkomprenis ke eruptis **ribelo**. Surloke estiĝis furioza batalo inter la sekvantoj de Harald kaj tiuj de lia filo. Mia hipotezo do estas ke la ĉaro kun la runŝtono estis **renversita**, tiel ke la komenco de la teksto nun estis supre. Sed dum la tumulto, kiu finiĝis per bruligo de ĉiuj domoj kaj la palisaro, kompreneble neniu atentis pri tio.

Kaj **post la ribelo** neniu plu atentis pri Jelling. Harald havis fidelajn trupojn, sed la ribelantoj estis pli multaj. Li fuĝis al la lando de sia bopatro Mistivoj, sed la armeo de Sven postkuris lin kaj mortigis lin tie. Saxo asertas ke Sven transportigis la korpon de Harald al Roskilde kaj entombigis lin tie, sed tio preskaŭ certe estas malvera. Se restas ostoj de Harald, ili kuŝas ie en Meklenburgio.

La batalistoj de Sven Forkbarbulo bruligis ne nur ĉion en Jelling, sed ankaŭ plurajn el la treleborgoj. **Harald estis tiel malpopulara** ke la homoj malzorgis ne nur liajn konstruaĵojn, sed ankaŭ la memoron pri ili. Kaj ĉar la konstruaĵoj estis esence el ligno, tio estis des pli facila. Oni neeviteble rememoras la fablon pri la tri porketoj kaj la granda, malbela lupo: Ne taŭgas konstrui per pajlo aŭ ligno, nepre necesas brikoj kaj ŝtonoj!

## Kio poste okazis

Tiel do fiaskis la plano de Harald Bludentulo. Sed kio estis la plano de lia filo, mortiginto kaj posteulo **Sven Forkbarbulo**?

Unuavide Sven ŝajne volis repeli la Kristanismon kaj reinstali la malnovajn diojn. Tio certe estis la vidpunkto en **Bremeno**. La ĉefepiskopejo de Bremeno estis taskita disvastigi la Kristanismon norden. Ĝi kunlaboris kun Harald por Kristanigi Danion, kaj nun ĉio estis perdita.

Sven ankaŭ lanĉis grandskalan vikingan atakon en **Anglion**. Krome li batalis kontraŭ la Norvega reĝo **Olav** kaj sukcesis mortigi lin. Olav estis la unua Kristana reĝo de Norvegio kaj poste estis deklarita sanktulo.

Tamen Sven ne nur atakis Anglion, sed ankaŭ **konkeris** ĝin. Tion ne farus ordinara vikinga ĉefo, ĉar tiam li ja ne povus reveni la postan jaron kaj rabi denove. Anstataŭ rabadon, Sven enkondukis multe pli tolereblan kaj daŭripovan **impostan** sistemon.

Sven do ne volis **repeli la Kristanismon**, sed nur rezignis pri vasaleco sub la Franka imperiestro. Anstataŭ importi la Katolikan eklezion el Germanio, li importis ĝin el Anglio. Kun la Kristanismo venis krom monaĥoj ankaŭ ŝtonmasonistoj, moner-stampistoj, skribistoj kaj entute civilizo. Sed Saxo ne povis diri rekte ke Sven la tutan tempon estis sur la Kristana flanko – unue ĉar Kristana filo ne rajtas mortigi sian patron, due kaj ne laste ĉar pagana reĝo devas *akcepti* la Kristanismon, li ne rajtas preni mem!

Anglion la Danaj reĝoj sukcesis teni nur dum du generacioj. Tiam oni do devis repaciĝi kun Bremeno. De la Germana flanko oni ŝatus **sanktigi** Harald Bludentulon, sed tion la Danoj vetois. Aliflanke ne eblis sanktigi

Thyra-n, ĉar ŝi ja estis pagano. Ĉe Aggesen tio estas ŝia sola eraro, kaj Saxo eĉ sugestas ke Thyra mem provis konvinki Gorm-on kristaniĝi.

Aggesen kaj Saxo ambaŭ ekspluatas Thyra-n en sia **tre forta kontraŭGermana tendenco**. Laŭ la vidpunkto de la nacia historio, tio ja estas tre natura. Aggesen kaj Saxo tamen vivis duonjarmilon antaŭ la invento de la naciismo. Ilia partio estas tiu de la papo kontraŭ la imperiestro – ne tiu de Danoj kontraŭ Germanoj. Karolo la Granda tre harmonie kunlaboris kun la eklezio, sed ducent jarojn poste la eklezio kaj la imperio furioze luktis inter si pri la potenco.

**La pasinteco konstante ŝanĝiĝas.** Antaŭ okcent jaroj pri tio kulpis la enkonduko de Kristanismo. Hodiaŭ kulpas pri tio la transnacia ondo inter la historiistoj. La historio estas longa, kaj oni povus paroli pri ĝi dum horoj. Sed mi finu ĉi tie.